

AMO 78 Enkonduko nov 13 SMG parol-notoj

La valoro de tradukado

Zamenhof estis dekomence grandkvanta plenumanto de tradukado.

Li komprenis, ke ne sufiĉas doni la gramatikon kaj vortlistojn.

Li devis montri la lingvon vivokapabla kaj montri ĝian praktikan uzon.

Tradukoj donis al la pioniraj esperantistoj manieroj kompreni la novan lingvon kaj kompari ĝin kun io konata.

La defioj de tradukado plie montris al li, la malfortajn kaj kuracendajn punktojn en la evoluanta lingvo.

Do, la unuaj tradukoj ne havis ĉefe literaturan celon, sed varban, diskonigan kaj edukatan.

Kabe kaj ĉiam pli da pioniroj suplementis la korpuson de bonaj tradukoj.

En la epoko de la Budapeŝta skolo, Baghy, Kalocsay kaj aliaj transigis la emfazojn al literaturaj celoj. Tion spronis la postaj skotaj kaj iberiaj skoloj.



Baghy kaj Kalocsay kune en 1961

Kroatio avangardis en la uzo de tradukoj por interŝanĝi kulturajn valorojn inter malpli disvastigitaj kulturoj – naturaj aliancoj por Esperanto.

En la nuna AMO-seminario ni kolektiĝis honore al la kroata tradukistino Lucija Borčić. La seminario estos bona ebleco ekscii pli pri ŝiaj kontribuoj al la verka kaj traduka arto, sed same pri aliaj foje kaŝitaj perloj kaj pristudi perspektivojn por la estontaj direktoj por la tradukaj artoj.

https://www.esperanto.hr/lucija_borcic_omagxe.htm

